Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Julio-Aŭgusto 2015 | n-ro 7–8 (1321-1322)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!



**Plu pri "Novaj situacioj ĉe politikaj partioj", p. 4-7**



**Alvoko de Nepala Esperanto-Asocio, p.25**




**Mezorienta kaj nordafrika renkontiĝo en Hammamet, Tunizio, p. 27**

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la juli-aŭgusta numero de *Sennaciulo*, kun daŭrigo de la pasintfoja tem-dosiero pri novaj situacioj ĉe politikaj partioj. Ankaŭ ĉifoje venis abundo da diverspecaj kontribuoj por la ceteraj rubrikoj. Kelkaj eĥas al antaŭaj dosieroj, vi mem malkovru tion dum la legado. Dankinda estas la persistemo de kamaradoj, kiuj regule provizas *Sennaciulon* per materialo por diversaj rubrikoj. Substrekinda kaj ĝojinda estas apero de novaj subskriboj, ĉu el freŝe aliĝintaj kamaradoj, ĉu el spertaj plumoj, kiuj kutime esprimiĝas aliloke. Ĉu ankaŭ vi sekvos tiun ĉi ekzemplon ? Ankaŭ kontribuoj bildaj, ekzemple fotoj aŭ desegnoj, estas treege bonvenaj. Same pri helpantoj por la provlegado.

Aldone al *Sennaciulo*, alia grava intermembra ligilo estas la SAT-adresaro, kies nova eldono nun estas en preparo. Tiucele ĵus estis ekspeditaj 134 revok-leteroj al kamaradoj, kiuj ne vivosignis de 2013, por demandi al ili ĉu ili plu konsentas aperi en la membrolisto de la venonta adresaro. Financaj malfacilaĵoj neniam devas esti barilo al plua membreco en SAT, do se vi estas inter la ricevantoj, ne hezitu respondi jese, kaj eventuale pripensu kiun nefinancan kontribuon vi povas proponi por iel partopreni en la asocia vivo. Plie, por ĉiuj estas la ĝusta momento rekontroli, ĉu estas io ĝisdatigenda en la adresaro pri viaj kontakt-informoj, profesia situacio kaj interesoj.

Agrablan kaj pripensigan legadon deziras al vi

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2016 : 31a de decembro 2015

Sennaciulo 9-10 (1322-1323) : 31a de aŭgusto

Sennaciulo 11-12 (1324-1325) : 30a de septembro

### Atentigo pri kotizpagoj en Japanio

Kamaradoj loĝantaj en Japanio atentu, ke la valoro de la kotizo por 2015 estis reĝustigita de 7150 al 7000 enoj, kongrue kun la ŝanĝiĝo de la respektivaj kurzoj de eŭro kaj eno. Detalojn pri la pagmaniero vi trovos en paĝo 30.

## Enhavo


### Temdosiero "Novaj situacioj ĉe politikaj partioj"

4 Kiel aparato malproksimiĝas de sia bazo (2-a parto) Julian MISCHI

6 La komuna saĝo: la sesa sistemo partia kaj la vivanta viglo de la revolucio usona (2-a parto) Trapinoaro Lauvole

### Socio

8 Kontraŭfaŝisma Agado de Stokholmo : Raporto el Roĵavo Nikolas Xil CARVALHO

10 Dekkelke da landoj mortpunas ateistojn Mir-Ko

13 Jen kio ĵetas novan lumon sur Usonon kaj la lingvan imperiismon Roland PLATTEAU

14 Movoflegado en Francio : scienca kaj politika kunteksto Nelli DARBOIS

### Agroekologio kaj Klimato

16 La agroekologio, solvo al la klimatŝanĝiĝo Robin' BETO

### Beletra Angulo

17 Joli Julia SIGMOND

### Liberecana Frakcio

19 Barcelona semajno pri Esperanto kaj la liberecana movado (1-a parto) Miguel FERNÁNDEZ

### Komunista Frakcio

23 Raporto kaj perspektivoj Lumeto ECHAPPÉ

### El la leterkesto

23 Malfermita letero pri la tri turoj Sen RODIN

24 Denove arĥitektoj uzas Esperanton Ian FANTOM

### Tra Esperantio

25 Alvoko de Nepala Esperanto-Asocio Bharat Kumar GHIMIRE

26 Recenzo de "Homoj de Putin" Renato CORSETTI

27 Invito al la kunorganizo de la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto Princo Henriko OGUINYE

Mezorienta kaj Nordafrika Kunveno en Hammamet, Tunizio Saioa ESCOBAR

### Intelekta Memdefendo

28 Solvoj de l' cerbumigoj de la numero Majo-Junio 2015

Novaj cerbumigoj Diana RIŜAR

29 El la iloskatol' de l' intelekta memdefendanto Andreo HOARO

### El la SAT-Administrejo

29 Nekrologoj

30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:* ***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***